

Theodor Storm,  
La urbo (2a versio)

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Ĉe l' griza strand', ĉe l' griza mar'  
Situas la urbet';  
Nebulas sur la tegmentar',  
La monotona bru de l' mar'  
Aŭdiĝas tra l' kviet'.

Arbar' ne estas tie ĉi,  
Ne kantas bird' sen ĉes';  
Anseroj nur, kun dura kri',  
Forflugas alte preter ĝi,  
Ĉe l' strando flirtas gres'.

Sed pendas mia kor' de vi,  
Vi griza urb' ĉe l' mar';  
De la juneco sorĉ-graci'  
Ridante kuŝas super vi,  
Vi griza urb' ĉe l' mar'.

*Traduko de la Germana poemo "Die Stadt" de THEODOR STORM (Teodoro Stormo, \*1817-09-14 - †1888-07-04) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04).*

*Arg-173-348 (2004-02-22 14:30:28)*

Theodor Storm,  
Die Stadt

Am grauen Strand, am grauen Meer  
Und seitab liegt die Stadt;  
Der Nebel drückt die Dächer schwer  
Und durch die Stille braust das Meer  
Eintönig um die Stadt.

Es rauscht kein Wald, es schlägt im Mai  
Kein Vogel ohn Unterlaß;  
Die Wandergans mit hartem Schrei  
Nur fliegt in Herbstesnacht vorbei,  
Am Strande weht das Gras.

Doch hängt mein ganzes Herz and dir,  
Du graue Stadt am Meer;  
Der Jugend Zauber für und für  
Ruht lächelnd doch auf dir, auf dir,  
Du graue Stadt am Meer.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas THEODOR STORM (Teodoro Stormo, \*1817-09-14 - †1888-07-04).*

*Arg-173-345 (2004-02-22 12:35:36)*